

de la branĉo al la tero. Sur la tero la koko mangas. La kato falas kaj frapas la kokon.


"Kokorikoooo!" ĝi krias.

La koko timas kaj flugas for.

Ĝi forflugas de la domo, kie dormas la profesoro. Ĝi flugas al granda longa domo apud kiu la koko vidas teruran nigran beston! Blanka fumo venas el ĝia buŝo kaj en ĝia stomako estas fajro. La granda domo estas stacidomo. La 'besto' ne estas besto; ĝi estas trajno kun mal-

nova vapora lokomotivo.

La koko timas. Ĝi rigardas la teruran beston, kiu faras laŭtan bruon kaj ĝi ne vidas sonorilon kiu pendas de la tegmento de la stacidomo.



* Ĉi tiu koko ja loĝas en Nederlando, kaj kutime krias "Kukeleku" kiel aliaj nederlandaj kokoj. Sed ĉi tiu koko loĝis kiel kokido en Francio, do kelkfoje ĝi krias france: "Kokoriko".

La koko subite trapas la sonorilon. Ĝi sonoras: "Bim! Bam! Bom!"

"Kokadudiduuu!" krias la koko.

Ve! La sonorilo estas la signalo por la foriro de trajnoj. La 'besto' kriegas. La fumo estas nigra kaj densa; la lokomotivo fajfas denove. La trajno foriras de la stacidomo. La estro de la stacidomo vidas la trajnon, kiu foriras. Li krias: "Revenu! Revenu! Estas nur la sesa kvardek kvin!"

Sed la trajno ne revenas. Ĝi foriras. La estro de la stacidomo timas, ĉar la trajno iras tro frue kaj ĝi iros al leyponto. Eble estos danĝera situacio ĉe la leyponto. La stacidomestro kuras al la telefono. Sed vidu kie estas la telefono. Sur la muro, sub la sonorilo. Kiam la koko frapis la sonorilon, tio falis kaj frapis la telefonon. La telefono ne plu funkcias.

* Ĉi tiu koko ja loĝas en Nederlando kaj loĝis en Francio, sed ĝi en la ternejo studis la anglan dum longa tempo kaj do kelkfoje krias ankoraŭ brite: "Kokadudidu".

